

ESPERANTO

sub la suda kruco

marto 2025





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 32[1] numero 157 marto 2025

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio

Redaktisto: Terry Manley

Provlegantoj: Donald Rogers, Trevor Steele, Nicole Else

Kunordigisto: Jonathan Cooper

Kontaktadreso: esk@esperanto.org.au

AEA – ESK

GPO Box 2122

Melbourne, Victoria 3001

Australia

Abonoj kaj pasintaj numeroj

Esperanto sub la Suda Kruco estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA: esperanto.org.au / info@esperanto.org.au

NZEa: esperanto.org.nz / esperantonewzealand@gmail.com

Kiel kontribui al Esperanto sub la Suda Kruco

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk@esperanto.org.au

Artikoloj kaj originalaj en Esperanto kaj tradukitaj en Esperanton estas akcepteblaj. Sed NE sendu permaŝinajn tradukojn (ekzemple per Google Translate).

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

1a de majo 2025

La redaktistoj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne necese spegulas la opiniojn aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2025 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 2207-0087

SUR LA KOVRILLO: *Petro Danzer antaŭ arbo Ruĝa Tumulto*
(*Quisqualis mussiendafolia*). Vidu paĝon 30.

ENHAVO

Antaŭparolo	04
Filozofo, pedagogo, teologo – Komenio	05
Fotokonkurso 2025	07
Poeziangulo	11
Konsilo por kontribuontoj	12
La knabino kun la longa hararo (4)	13
Malluma emuo	18
Decimala tempo	21
Kvizoj pri logiko	23
Solvo de komputila krucvortenigmo	23
La originoj de ĝino kaj ĝiaj uzadoj	24
Kreema Kursaro	26
Somerkursaro 2025: du raportoj	29
El la regionoj	30
Internacie	33

En mia raporto al AEA mi dankis al: la kontribuantoj, kiuj sendas artikolojn diverstemajn por plenigi la paĝojn; Joanne Johns, kiu konektas nin al la nuntempaj aferoj en la reta mondo; Jonathan Cooper, kiu regalas nin per arta, matematika aŭ folozofia temoj; Donald Rogers, ofte pri sciencaj aŭ naturmediaj temoj; Franciska Toubale, pri E-eventoj, kiujn ŝi partoprenis kaj vidpunktoj pensigaj; Trevor kaj Katja Steele, kiuj kontribuas pri historio kaj arto; Nicole Else, pri verkado, familio kaj pri puzloj; Vicky Crickett, kiu nun aldonas E-enigmojn por solvi; David Rockell kaj Heather Heldzingen, kiuj sendis artikolojn pri Esperantujo; Kit Kelen, kiu kontribuas per poemoj, kiuj aperos en antologio estontece; kaj David Ryan pri vojaĝado (ĉu li iam estas hejme?) kaj aliaj temoj. Menciinda estas ke David ricevis gratulojn por la plej ofta kontribuanto. Notinde en la unua eldono en Marto, David verkis la unuajn tri artikolojn kaj en la lasta por Decembro, li verkis la lastajn tri artikolojn. Se mi ne menciis vian nomon kaj vi kontribuis en 2024, mi pardonpetas. Se vi ne kontribuis, KONTRIBUU!

Mi dankis ankaŭ al la provlegantoj,

Donald Rogers, Trevor Steele kaj Nicole Else, kiuj helpas prezenti gazeton lingve fidindan. Pro limdatoj kaj malfruaj artikoloj foje estas iom da premo provlegi ĝin sed la teamo ĉiam helpas. Dankojn al Jonathan Cooper, kiu alprenas mikspoton de vortoj kaj bildoj kaj magie kreas artaĵon, kiun vi povas plezure trafolumi kaj legi en la komforto de via brakseĝo. Krom tio, li ofte notas tiujn etajn aferojn, kiuj eskapas la rimarkon de la provlegantoj por plu poluri la enhavon.

Dankojn ankaŭ al Heather Heldzingen por la elsendado de la gazeto kaj al AEA kaj NZEA pro daŭranta subteno de ĝia publikado.

Jonathan Cooper starigis novan forumon por ke Aŭstraliaj Esperantistoj povu interkomunikiĝi inter si:

www.reddit.com/r/EsperantoAus

Se vi havas novaĵon, kiun vi deziras tuj dissendi, uzu ĝin, kaj legu ĝin.

Se via novaĵo ne bezonas tujan atenton, sendu ĝin ankaŭ al ESK. Du rubrikoj aperas en ĉi tiu eldono: *El la regionoj* kaj *Internacie*. Kontribuu al tiuj, ni petas.



Voluntuloj voĉlegas por 3ZZZ dum la adelajda kongreso

Filozofa, pedagogo, teologo – Komenio

KATJA STEELE (ADELAJDO)

Johano Amoso Komenio (ĉefe Ján Amos Komenský, latine Comenius) naskiĝis la 28an de marto 1592 en moravia urbeto Nivnice (nuna Ĉeĥio). Liaj vivsuferoj komenciĝis jam en lia 12a jaro per la morto de la gepatroj, kaj daŭris per la bruligo de urbo Strážnice, kie li trovis anstataŭan hejmon – ĝis la suferado, kaŭzita de kontraŭreformaciaj fortoj, tra mizeroplena migrado en fremdaj landoj, ĝis lia morto en Amsterdamo la 15an de novembro 1670.

Post studoj en universitatoj en Herborn kaj Heidelberg (Germanio) li vivis dum kelkaj jaroj en Ĉeĥio, laborante kiel instruisto kaj poste pastro. En 1618 komenciĝis la 30-jara milito. En 1620 estis venkita la bohema protestantismo kaj la protestantoj estis severe persekutataj de la kontraŭreformacio. Komenio devis kune kun miloj da samkonfesiuloj forlasi sian patrujon. Li vivis kiel ekzilito en Pollando (tie li instruis la polan, la ĉeĥan kaj la germanan lingvojn) kaj intertempe restadis en Britio (1641–42), poste en Svedio (1642–48). En la urbo Sárospatak (nuna Hungario), li havis eblecon elprovi siajn instruajn teoriojn kaj libere evoluigi siajn ideojn en propra lernejo (1648–50). Lia vojo finiĝis en Nederlando (1656–70), kie li mortis kaj estas entombigita (en Naarden). Al tiuj ĉi landoj, precipe al Svedio, li estis invitita por reformi tie la lernejaron kaj la publikan vivon.

Komenio estas konata ĉefe kiel granda pedagogo, sur kies principoj ankoraŭ hodiaŭ staras la moderna lernejsistemo kaj pedagogia scienco. Lia unua mondfama verko estis *Didactica*

Magna (Granda didaktiko), 1632. Vastan eĥon atingis liaj prilingvaj verkoj kaj lernolibroj *Janua Linguarum Reserata* (Pordego de lingvoj malfermita) kaj *Orbis Pictus* (Mondo en bildoj), en kiu li prezentas diversajn temojn per bildoj kaj tekstoj por plifaciligi la percepton de la lernantoj. Tiu ĉi libro fariĝis furorlibro en la tuta Eŭropo.

Dum sia tuta vivo, Komenio okupiĝis pri la ideo de reeduko de la homa socio surbaze de morala kaj racia edukado. Liaj porpacaj kaj humanismaj klopodoj, lia kredo pri la bona estonteco de la propra nacio kaj interfratiĝo de ĉiuj popoloj, respeguliĝis ankaŭ en liaj traktadoj kun politikaj reprezentantoj de la tiam Eŭropo. Al tio rilatas lia nefinita, ampleksa verko *Ĝenerala Konsulto pri la reboniĝo de la homaj aferoj*, kies kvina parto, *Panglottia* (Universala lingvo), estas dediĉita al la problemo de universala lingvo kaj ĝia strukturo.

En sia *Via Lucis* (Vojo de la lumo) li proponas krei internacian sciencistaron por komuna solvado de sciencaj kaj pacaj problemoj. En la verko Komenio montras, kian malhelpon en la internaciaj rilatoj kaŭzas lingvodiverseco, kaj samtempe pledas por artefarita lingvo uzota de la tuta homaro. Li postulas, ke inter edukitaj homoj estu konservitaj la hebrea, greka kaj latina, kaj ke la nacioj konservu al si kaj kultivu ankaŭ siajn proprajn lingvojn. En la verko li esprimis la deziron pri lingvo tute nova, kiu estus pli facila, pli agrabla, pli perfekta ol ĉiuj lingvoj ĝis nun konataj.

En la tempo de Komenio ekzistis internacia lingvo, servanta al ĉiuj tiamaj

kleruloj, nome la latina. Komenio mem perfekte regis ĝin; lia tuta verkaro estas verkita en ĝi. Kaj spite al tio post sia dumviva sperto li devis konstati, ke tiu ilo ne estas perfekta. Oni devis esti tre kuraĝa por klare proklami tian "herezaĵon" en la tempo de la Sankta inkvizicio, ĉar la latina estis la lingvo de la katolika eklezio.

"Se Zamenhof estas la patro de la mondlingvo kaj Schleyer (inventinto de Volapük) lia pli aĝa frato, Komenio sendube estas la Avo de tiu sama ideo," skribis Jeremi Gišron (*Israela esperantisto*, dec. 2002). Ne ĉar li mem konstruis lingvon, aŭ provis tion fari; li nur montris la eblecojn, kiuj ekzistis pri aŭ apriora aŭ aposteriora lingvo, kaj klarigis la neceson, eblecon kaj potencialon de tiaspeca nova lingvo. Ni menciuj, ke Zamenhof bone sciis

pri Komenio kaj studis liajn librojn.

Komenio publikigis pli ol 150 volumojn kaj estis nomita "Patro de la didaktiko". En 1657 aperis *Opera Didactica Omnia*, la kolekto de liaj kompletaj instruaj skriboj. Pri la edukado de la junularo li opiniis: "Ni ne rigardu infanojn, kiel ili aspektas nun, sed al kio ili estas destinitaj: fariĝi post ni Diaj estroj de la mondo."

Komenio insistegas pri paco kaj pri la konstruado de harmoniplena trankvila vivo por ĉiuj homoj kaj por ĉiuj tavoloj de la socio. La arto regi aliajn homojn devas baziĝi sur saĝeco kaj ne sur forto, sur libereco kaj ne sur altrudo, sur racia pripenso kaj ne sur ruzado. Neniam la propra libereco devas iamaniere eĉ minaceti la liberecon de aliuloj.

Laŭ Komenio, unu el la vojoj por atingi daŭran pacon sur la tero estas instruiteco de la homaro. Li donis ankaŭ skizon pri la estonta tutmonda kunlaboro, pri strukturo de la supera mondorganizo koncerne politikon, kulturon kaj religion.

Leibnitz, la fama filozofo, skribis: "Venos, Komenio, tempo, kiam aro da nobluloj estimos vian faron kaj estimos ankaŭ la revon de viaj esperoj."


Uzita literaturo

Israela esperantisto, N-ro 137

Komenio kaj la internacia lingvo. Kompilis Oldřich Kníchal, ĈEA 1974

Od Komenského k Zamenhofovi, František Hýbl. Muzeo de Komenio en Přerov, 1997

La vojo al harmonio, Jaroslav Karhan, KAVA-PECH 2016 **E**



Kongresa fotokonkurso 2025

Ek de Adelajdo en 1919, okazis fotokonkurso dum ĉiu kongreso. (Tio eĉ okazis dum la dua virtuala kongreso en 2022.) Oni invitis kongresanoj sendi elektronikajn fotojn pri la kongreso – aŭ pri Esperanto – al Jonathan Cooper, kiu juĝis ilin kaj elektis iujn por ricevi premiojn. Jen la premiitaj fotoj de la 2025 kongreso, kaj la venkinto de la “Popola elekto”.



1a premio: Sarah Palmer,
Saltante en Esperanton



2a premio: Louise Moriarty,
Sandor en Glenelg



3a premio: Joseph Horst, *Bifo kaj Bufo*

Daŭras >



Aparte inda: Helen Palmer,
Du esperantistinoj



Aparte inda: Katja Steele, *Helen*



Aparte inda: Louise Moriarty,
Kam Lee sub la spektoradego



Popola elekto: William Georgeson, *Suno tra la spektoradego*

Daŭras >

Kaj jen amuziga ekstra foto, farita de Helen Palmer, *Esperantistoj ridegas*:



Fine, la oficiala grupfoto, kiu ne estis parto de la konkurso, farita de Kam Lee:



Poeziangulo

MARCELLE FREIMAN

Jasmeno

Dum monatoj,odoro forestas, flarsenso
tiel vakue malakuta kiel lavakvo,
aŭ ia kemiaĵo – nenion
mi rekonas, aŭ iam ajn rekonis.
Provu memori kiel estis antaŭe
diras la terapiisto pri tio, kio okupas
nian estadon en la mondo,
aŭ, kiam mi raportas pri memoreto, specialisto
diras ke foje niaj cerboj haluciniĝas –
diras nenion pri memoro, tamen mi provas
trovi eĥojn – cinaman, mentan, eŭkaliptan
profunde inter miaj okuloj, malantaŭe de la
ostaj spacoj de mia fronta kranio – forajn
kiel moneroj faligitaj profunden en puton –
malgrandeco kiu proponas iom da lumo.

Tiam, iun matenon, tra malfermita fenestro
subita enveno de jasmeno – tiam ne plu.
Mi spiras, ĉu volante ĝian revenon? –
revenu, mi petas –
poste, la tinto de malproksima voko
tiam ne plu.

Ekstere la burĝonanta rampaĵo komencis
malfermi siajn florarojn kaj faligi tiujn printempajn –
puŝante mian nazon al la floroj – nenio –
ĉu mi tro penas?

Mi elektas bukedojn por porti enen – volante
kapti jasmenajn memorojn: ĝardenon,
kuŝadon sur la herbo, klaran ĉielon, vastajn
senlimajn tempojn estontajn – mondo
flosante per originoj.

Nun en glaso sur mia skribotablo, floroj moviĝas
en venteto, fluas parfumaj spuroj
duon-resonante – enspiru, ĉi tiu
devas sufiĉi nuntempe –
eble malrapida vekiĝo de nervoj,
iliaj fibroj blankaj kiel blankecaj petaloj,
korpo etendiĝanta en la aeran mondon
pliigante dum ĝi en – kaj enspiras.

kun KIT KELEN (MARKWELL, NSK)

Jasmine

For months, smell has eluded, olfactory
blankness dull as dishwater,
or something chemical – nothing
I know, or ever knew.
Try to remember how it was before
says the therapist of what occupies
our being in the world,
or, when I report a stirring, a specialist
says sometimes our brains hallucinate –
says nothing of memory, yet I try
to find echoes – cinnamon, mint, eucalyptus
deep between my eyes, back of the
bony spaces of my frontal skull – distant
as coins dropped deep in a well –
a smallness that offers some light.

Then, one morning, opening a window
a sudden rush of jasmine – then gone.
I breathe, will its return? –
come back, I beg –
then, the ping of a faraway call
then gone.

Outside the budding creeper has started
its opening sprays and falls of spring –
pushing my nose to the blooms – nothing –
am I trying too hard?

I pick bunches to take inside – want
to catch jasmine memories: a garden,
lying on the grass, a clear sky, spacious
unbounded times to come – a world
afloat with beginnings.

Now in a glass on my desk, flowers move
in currents of breeze, perfumed traces waft
half-resonant – breathe in, this
has to be enough for now –
perhaps a slow waking of nerves,
their fibres white as whitish petals,
a body reaching into the airy world
augmenting as it draws in, and in.



Marcelle Freiman loĝas sur Gadigaltero, Sidnejo. Ŝi naskiĝis en Sudafriko en 1951 kaj migris al Britio en 1977, poste al Aŭstralio en 1981. Ŝia nuna poezia projekto estas versmemoraĵo de sia familio kaj sia

propra historio dum la rasapartismaj jaroj en Sudafriko. Ŝia tria kaj plej lastatempa libro estas *Spirit Level* (Puncher & Wattmann 2021). Ŝi estas honora lektoro en Macquarie University. **E**

Konsilo por kontribuontoj

JONATHAN COOPER (GOSFORD, NSK)

La redaktisto (Terry) kaj mi estas tre dankemaj pro ĉiu artikolo sendita. Tamen, nia laboro estos pli facila se kontribuontoj konscios pri kelkaj aferoj.

Teksto

- Bonvolu aldoni la urbon aŭ urbeton kie vi loĝas post via nomo
- La tekstodokumento devas esti en unu el la jenaj formatoj: .docx / .doc, .txt, .odt
- Sendu bildojn aparte. (Se vi volas montri kie ĉiu bildo estu, vi rajtas enigi malgrandajn versiojn.)
- Por ĉiu bildo, inkluzivu en la tekstodokumento la dosier-nomon, bildotekston kaj fotokrediton, se konataj (ekz. fotisto, artisto, fonto)

Bildoj

- Por esti taŭga por presado, ĉiu bildo devas esti sufiĉe granda. Pli grava ol dosiergrando (en kilobajtoj aŭ megabajtoj) estas la dimensioj en bilderoj (pixels = "px"). Ideale, la pli malgranda dimensio (alteco aŭ larĝeco) estu almenaŭ 3000 px¹
- Fotoj estu kiel eble plej klaraj kaj akraj
- Ĉiu bildo devas esti en unu el la jenaj formatoj: .jpeg/.jpg, .png, .tiff/.tif
- Bonvolu ne sendi (plengrandan) bildon enigitan en tekstodokumento

Dankon!

¹ Kiel eltrovi kiom da bilderoj (pixels) bildo havas? Vizitu bit.ly/bilderoj

Elĉerpaĵo 4 el membiografio de Catherine Gluck: La knabino kun la longa hararo

TRADUKITA DE TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)

Iom pri la verko: En 2023, kiam mi vizitis Esperanto-Domon en Sidnejo, mi rimarkis sur tablo libreton neimponan. Trafoliante ĝin, oni ne trovas ligan al Esperanto escepte, ke Kep Enderby verkis la enkondukon por ĝi. Mi memoras la nomon de la aŭtorino, ĉar en la 1990aj jaroj ŝi heredigis sufiĉe grandan sumon al la Esperanto-Federacio de NSK. Do mi portis la libreton hejmen kaj post legado pensis, ke valoras traduki ĝin memore al Catherine Gluck.

Catherine naskiĝis en Hungario en 1906 kaj enmigris Aŭstralion en 1950. Jen iom el la traduko.

Glück Domservista Agentejo

Alexander, la amiko de mia edzo, iĝis reprezentanto de Londona domserva agento, kiu sendis domservistojn de Hungario al Anglio. Li bezonis anglan korespondanton kaj dungis min. Mi ne ŝatis lin. Li uzis ian strangan postrazan parfumon, kiun mi ne povis toleri. Mi petis al li interŝanĝi seĝojn. Mi sidos en la lia, kaj li en la mia. Li ne komprenis min, sed mi klarigis, ke mi deziras aĉeti la agentejon. Li surpriziĝis sed indikis por kiom li vendus la agentejon. Senhezite mi akceptis la vendkoston kaj finnegocis por ke li ne havu tempon eliri la negocon.

Jen la komenco de la Glück Domservista Agentejo. Baldaŭ mi iris la Anglio kaj sukcesis reprezenti 22 anglajn domservajn agentojn. De tiam mi estis tre okupata, laboranta ĝis 18 horoj tage sed rezulte mi riĉiĝis. Mi konstante korespondis kun anglaj agentoj, instruis hungarajn servistinojn antaŭ ol ili iris al Anglio, kaj aranĝis vizojn por tiuj kun la Britaj instancoj kaj transirajn vizojn kun la hungara ambasadorejo.

Ni aĉetis novan aŭton, Fiat Topolino, kun registrada numero AI 668. Por havi rajtigilon ŝofori mi devis stiri grandan

pezan aŭton, Fiat. Oni metis kusenojn sur la seĝo, alie mi ne povus teni la stirilon. Estis vintro kaj miaj fingroj preskaŭ frostiĝis. Inspektoro sidis apud mi kaj donis al mi instrukciojn. Je la fino de la ekzameno li diris: "Ho sinjorinetto, vi bezonas pli da ekzercado speciale kiam retroiranta." Poste mi veturis kun privata instruisto dum dek tagoj.

Estis malmultaj aŭtomobiloj survoje en Budapeŝto tiam. Mi ne kuraĝas veturi nuntempe pro la multaj aŭtoj kaj ĥaosa trafiko. Mi ŝoforis pli ofte ol mia edzo, transirante la Danubon per la Ponto Margaret, al Buda kaj la belga kaj brita ambasadorejoj. Mi bezonis proksimume 50 vizojn semajne por sinjorinoj domservistaj iri al Britio. Mi sendis tiujn ankaŭ al Jersey kaj Guernsey, la Kanalaj Insuloj, apartenanta al Britio, sed pli proksima al Francio.

Patro mortas, 1937

Patro mortis la 24an de januaro 1937 pro manĝaĵa venenado. Mi ankoraŭ kredas, ke lia nova dommastrino kulpis. Kelkajn semajnojn poste, Fred forlasis sian administran postenon, iris al Anglio, kaj registris ĉe la Master Smith Lingva

Daŭras >

Instituto por lerni la anglan.

Ĉe nia apartamentaro ni dungis geedzan paron, kiu loĝis en apuda apartamento kun banĉambro. La edzino dommastris kaj ŝia edzo prizorgis la hundon, notis mesaĝojn, poluris ŝuojn ktp. Niaj fenestroj alfrontis al Erzsébet körút kun balkono tiuflanke. Kiam speciala evento aŭ procesio okazis en nia avenuo ni rigardis ĝin kun geamikoj de la balkono. Estis privata klubo en la konstruaĵo, kiu sendis al ni menditan tagmanĝon el ties menuo. Ni manĝis nur matenmanĝon hejme, vespere ni manĝis aliloke.

Estis bone konata, ke sezonaj entreprenoj ne profitis, se ne estus pli ol dek tri sunbrilaj kaj varmaj semajnofinoj. Foje la financo ne bonstatis kaj mi devis trovi laboron por helpi pri la lupago ktp. Mia unua posteno post geedziĝo estis parttempa kun Sinjoro Márton Neuman, por prizorgi lian privatajn aferojn. Mi prizorgis liajn kontojn kaj korespondadon. Márton Neuman estis liberpensa kaj lerta entreprenisto. Li estris la plej grandan bildkartan preskompanion en Hungario. Li estis la unua meti skribaĵojn sur poŝtkartoj kaj ofte petis min fari poemon aŭ versaĵon por surprisi sur la poŝtkartojn. Estis geedzofestaj, naskiĝfestaj kaj nomfestaj kapvortoj al kiuj mi aldonis versaĵojn. Márton Neuman tre ĝojis pro miaj poemoj kaj rekompencis min malavare. Mi laboris ĉe lia domo kaj ofte sidis kun lia edzino kaj babilis. Baldaŭ ni amikiĝis. Ili enportis grandkvante paperon el Svedio kaj havis geamikojn tie. Kiam la persekutado de la judoj komenciĝis, ili decidis forlasi Hungarion kaj iri al Svedio, kaj sugestis, ke mi akompanu ilin. Tiam mia edzo estis en la deviga laborejo. Ili lernis ke la sveda ambasadorejo en Budapeŝto ofertis rifuĝon al judoj. Kiam la gesinjoroj Neuman decidis iri tien, ili invitis min, sed

ial mi neis. Mi estis ege bonŝanca ĉar la sekvan tagon la Hungara Sagkruculoj, kiuj respektis nenion, eĉ ambasadorejon, pafmortigis ĉiujn, kiuj iris tien.

Fred atendis la dommastrinojn ĉe la Londona Viktoria Stacidomo. Li helpis ilin trovi iliajn domojn kaj alkutimiĝi al iliaj laborlokoj novaj. Post nelonge Fred establis la "Klubon por Hungaraj Domdungantoj en Anglio". La sinjorinoj renkontiĝis tie dum nelaboraj tagoj. Fred helpis ilin solvi problemojn, kiel ŝanĝon de laborloko, sendadon de mono hejmen ktp. La klubo festis la 15an de Marto, publikan ferion en Hungario kaj foje iujn naskiĝtagojn kaj aliajn eventojn. Fred bone regis la anglan tiam.

Nia najbarino en Budapeŝto, Sinjorino Rózsi Fried, estris lingvan lernejon. Ni kunlaboris kaj kunpublikigis hungaran-anglan receptaran libron, (maldekstra paĝo en la hungara, kaj dekstra paĝo en la angla), kiu listigis vortojn por manĝaĵoj, domaj aparatoj kiel balailo, telero, taso, forno, alumeto; kaj verbojn kiel polurado, lavado, akvolavado, glatigado; kaj esprimojn por komenci simplan konversacion. La receptara libro iĝis tre populara kaj bone vendiĝis. Dume, la nombro de hungaraj dungantoj multigis kaj eĉ la hungara ambasadorejo en Londono mendis 100 librojn. Tiel la viena kotleto (Weinerschnitzel) populariĝis en anglaj restoracioj.

Bedaŭrinde la sukceso de la Glück Domservista Agentejo ne daŭris longe. Je la 1a de septembro 1939 la Belga Ambasadorejo rifuzis doni transirajn vizojn kaj estis nenia vojo por atingi Anglion de Hungario. Tiu decido de la Belga Ambasadorejo influis ankaŭ la sortojn de mi kaj mia edzo. Ni deziris detale fini aferojn de la somersezone kiel en aliaj jaroj. Tio postulis: la dismunton

kaj forpakon de ekipaĵo, maŝinaro, littukoj kaj la enhavo de la feriejoj apartamentoj; purigadon kaj ŝlosadon de tiuj; malplendigadon kaj kovradon per pajo de la naĝejo por eviti la malvarmegan vintron kaj eblecon de fendoj en ĝi; diskonekton de elekto, ktp.

Kiel mia mono atingis Anglion

Kun la helpo de mia frato en Londono mi kontrabandis mian monon el Hungario kaj deponis ĝin en la bankon de Westminster en Londono. Mia edzo ne havis monon pro malbona feria sezono. Mi deponis mian monon en kuran konton kun mia edzo. Tio ŝajnis saĝa kaj lerta ideo tiam. Funkciis jene: domdungito ricevis vojaĝkoston de la angla dunginto. Dum mia vizito al Anglio mi kaj Fred konsentis, se mi substrekis la nomon de la dungito, ke li ne sendu la vojaĝkoston donita de la dunginto, sed deponos ĝin en mian konton ĉe la banko de Westminster. La £4.10.0 por ĉiu dungitino estis kolektata de Fred kaj deponata en la bankon, kaj mi pagis tiom por la bileto en Budapeŝto per hungara mono. Laŭ tiu metodo mi sukcesis kontrabandi grandan sumon al Londono. Je la 5a de septembro 1939 mia bankbilanco estis £5320 en anglaj pundoj, sufiĉe granda sumo tiam. Malbonŝance, ĉar ĝi inkluzivis la nomon de mia edzo, kaj li ankoraŭ estis en Hungario, post la milito oni traktis ĝin kiel monon de la 'malamiko', kaj tial nehavebla. Multajn jarojn poste, en Aŭstralio, malgraŭ alta leĝkosto kaj longa atendo, mi ricevis nur 10 elcentojn da ĝi.

1939

Ni unue lernis pri la persekutado de la judoj, surprize de Vieno, la ĉefurbo de Aŭstrio. Kuzo de mia patro estis elstara kirurgo, ofte vokata al la Palaco de Habsburg. Ni ricevis leteron de li,

klarigante ke li ne plu povas agi kiel kuracisto ĉar li estas judo. La ŝildon ekster lia kliniko oni forprenis. Ni en Hungario ne kredis, ke tia leĝo povus ekzisti. Ni pensis, ke eble li fuŝtraktis iun kaj devis fermi la praktikejon. Baldaŭ iĝis kutimo ankaŭ en Hungario- similaj ordonoj normaliĝis.

Komenciĝis problemoj por judoj en Hungario kaj je la 3a de septembro ni decidis iri al Londono, ĉar ni havis parencojn tie. Kaj Fred kaj la frato de mia edzo, Ernest (li ŝanĝis sian nomon al EG Luck) loĝis en Londono. Ni komencis likvidi ĉion. Unue la pianon, tiam persajn tapiŝojn, pentraĵojn, arĝentvarojn, kristalojn, radioaparatojn, kameraojn ktp. Bedaŭrinde malbono frapis nin. Je la 1a de septembro la Belga Konsulejo rifuzis doni transirajn vizojn. Finiĝis nia libero! Nin la sorto kondamnis kaj komenciĝis infero en nia vivo.

Oni devigis min kaj mian edzon apartiĝi. Li iris al la Hungara Deviga Laborejo, devis vesti civitane kun brakrubando montranta la stelon de Davido. Li bonŝancis ĉar li estis arkitekto kaj oni uzis lin por estri vojkonstruajn maŝinojn en fora loko. Jen la komenco sed tiel daŭris nelonge. Ni ne havis multon por manĝi sed mi sukcesis havigi ĉokoladon, sardinojn, cigaredojn per la nigra merkato. Ankaŭ ŝtrumpetoj, gantoj, ŝaloj kaj sendotaĵoj al mia edzo haveblis. Subite komunikado ĉesis, kaj mi ne sciis eĉ kie li estis. Ĉia kontakto perdiĝis.

Komenciĝo de la persekutado de hungaraj judoj

Iun matenon juna armea oficiro alvenis kun ordono liveri nian aŭton, Fiat Topolino Al-668, per ŝoforo al la Armea Deponejo la sekvan matenon, ĉar ĝi estas juda posedaĵo. Mi informis lin, ke mia edzo

Daŭras >

estas ĉe fora Deviga Laborejo kaj mi ĵus komencis lerni ŝoforadon. Per rideto mi konvinkis la oficiron permesi prokraston de 48 horoj.

Kiam la oficiro foriris mi tuj kontaktis la garaĝon kaj petis ilin ekvendi la aŭton en 24 horoj kontraŭ iu ajn prezo. Ili argumentis ke mi devus ne vendi la aŭton ĉar mia edzo ĵus aĉetis ĉenojn por la radoj kaj aliaj aĵoj por ke ni povu veturi sendanĝere tra la neĝo al la montaro por skii. Mi devis insisti pri ekvendo de la aŭto. Ĝi vendiĝis je ridiga malalta prezo. Mi suspektis ke la posedanto de la garaĝo aĉetis ĝin. Tiam mi skribe informis la Armean Deponejon, ke mi edzo vendis la aŭton sen mia scio.

Mi opinias ke ĉi tiu evento indikis ŝanĝon de mia feliĉa vivo. Amika nejudaj najbaroj, kiu sciis pli pri "fonaj aferoj", konsilis min akiri ian manlaboron. Do mi aliĝis al klaso por lerni kiel fabriki gantojn kaj kravatojn. Miaj ledaj gantoj estis tiel sukcesaj, ke estis atendolisto por tiuj. Mi preferis fabriki kravatojn pro ties buntkoloroj, fajna silka tolaĵo, tegaĵo, sed estis pli malfacile vendi tiujn. Se vi havus ruĝajn striojn ili preferus bluajn, se vi havus punktatan ŝtofon ili preferus striitan. Sed baldaŭ eĉ tia laboro ĉesis.

Kiel absurda ke oni persekutiĝas pro sia religio je naskiĝo, sekvante la kutimojn de la gepatroj kaj respektante la tradiciojn. Kiam oni travagas la botanikan ĝardenon estas multaj arboj, arbustoj kaj plantoj de malsamaj alteco, formo de folio, kaj verdeco. Ili staras apude kaj proksime en harmonio, paco kaj ekfloras. Kial homoj ne povas kunekzisti same?

La sekva epoko de mia vivo iĝis tre malfeliĉa, sen la sekureco de geedziĝo kaj komforta loĝejo, kaj senigitaj de niaj posedaĵoj. Eĉ nia filatela kolekto de dek du albumoj kaj juvelaro, kiuj estis deponitaj

en sekuran bankokeston neniam plu vidiĝis! Mi estis tute izolita, sen espero por forlasi la landon kaj sen ia ajn normala vivo. Sed neniu tiam konsciiĝis, ke la ekzistanta paco finiĝis kaj tre malfeliĉa estonteco komenciĝos. Iel mi kontentis ke miaj gepatroj ne plu vivis. Por prizorgi kaj ĝeni pri ili, malhelpus pri mia koncentriĝo je mia vivo kaj estonteco.

Germana invado kaj restado en Hungaro, 1944

La germana armeo invadis Ĉeĥoslovakion en 1938, kaj Pollandon en 1939. Pro tio multaj ĉekoj kaj poloj rifuĝis al Hungario. Ili havigis al si dokumentojn per la nigra merkato por eskapi persekutadon. Hungario estis la lasta el la Hitleraj plivastigaj projektoj. La germanoj marŝis en Hungarion la 15an de oktobro 1944 kun kanonaro, militmaŝinoj, pafiloj, tankoj ktp, avertante ke eĉ la restaĵo de la ekzistanta paco finiĝis. Avertsonoriloj ofte eksonis, kaj homoj devis forlasi siajn loĝejojn kaj fuĝi al subteraj ŝirmejoj. Tio okazis en decembro 1944. Estis proksimume 800 000 judoj en Hungario tiam, 240 000 en Budapeŝto.

Afiŝo kun granda flava stelo de Davido estis metita sur la pordegon de nia konstruaĵo, kiu post tiam estis deklarita "judan domon" kaj la enirejoj estis ŝlositaj. Oni permesis al ni eliri nur inter la 11a kaj 12a horoj por aĉeti manĝaĵon de la butikoj. Nenio alia permesiĝis, nek vizito al poŝtoficejo, nek telefonvokoj, nek iri ien ajn krom atendi vice por manĝaĵo. Ni ricevis tagajn kuponojn por pano, sukero, oleo, lakto ktp. Ĉar ĉiuj iris al la butikoj samtempe, ni devis kuri al la atendovico. Plej ofte ni ne atingis la vendoserviston kaj devis reveni sen manĝaĵo. La kuponoj estis por tiu tago, la permesata elirhoroj pasis, kaj la kuponoj ne validis por la



Post la invado de Ĉeĥoslovakio: Adolf Hitler en Praga Kastelo, 1939

sekva tago.

Mi estis la plej juna loĝanto en nia konstruaĵo. Estis kuracisto, advokato, bankisto, merkato, ĉiuj maljunaj kaj preskaŭ senilaj, ankoraŭ loĝantaj kaj apartamentoj. Ili ploris konstante, sentantaj bedaŭron por si mem, pensantaj pri la pasinteco, lamentantaj kaj vokantaj siajn forajn infanojn. Mi estis la sola frontanta la veran situacion kaj baldaŭ organizis kunvenon, ĉar estis necesa havigi al ni manĝaĵon! Mi sugestis ke ni metu ĉiujn kuponojn sur la tablon kaj ke, unu ankoraŭ kapabla persono atendu vice

por unu speco de manĝaĵo. Ekzemple unu persono kolektos la oleon, do ricevos ĉiujn poroleajn kuponojn. Alia ricevos ĉiujn porsukerajn kuponojn, ktp. La loĝantoj bonvenigis kaj akceptis miajn proponojn kaj ni sukcesis uzi ĉiujn kuponojn. Ni almenaŭ havis plenajn stomakojn.

Post kelkaj tagoj frue en la mateno ni vekiĝis kaj aŭdis laŭtan krion, "Inspektisto!" Oni ordonis nin forlasi niajn apartamentojn, lasante ĉion escepte unu ŝanĝon de subvestoj kaj vestoj, kaj ariĝu sur la grundetaĝo. Iuj pli grandaj

Daŭras >

judaj familioj el aliaj konstruaĵoj loĝos en nia konstruaĵo. Mi devis translokiĝi al la tria etaĝo en unulitan apartamenton. Naŭdekjaraĝa viro kunloĝos kun mi. Bonŝance la kuirejo estis granda kaj ni metis liton en ĝin. Ni devis uzi la saman banĉambron kaj la kuirejon. Mi povis uzi la kuirejon por unu horo en la mateno kaj unu en la vespero. La maljunulo ne havis monon. Mi devis pagi por la luado, elektro, gaso, rubaĵkolekto ktp. Kaj mi

ankaŭ devis manĝigi lin kaj purigi la apartamenton. Mi ne ŝatis lin: li ronkis laŭte tra la tuta nokto kaj ne ŝanĝis siajn vestojn pro embaraso. Li havis longan malhelan barbon, neniam sin razis kaj ne eĉ lavis sin. Sed mi devis silenti kaj akcepti la situacion. Mi pensas ke li forlasis la liton nur post mi foriris. Mi vidis lin nur en lia piĝamo. En iuj aliaj apartamentoj dudek loĝantoj devis kunloĝi, kun nur unu necesejo. Kia mizera vivo! 

Malluma emuo

Mi ne memoras multon el la fruaj jaroj de mia bazlerneja tempo, sed tio ĉi restos ĉiam en mia memoro: mi demandis la instruiston, “Sinjoro, kiom da tempo la aborigenoj estis en Aŭstralio, antaŭ ol Kapitano Cook malkovris la landon?” La instruisto mansvingis por komprenigi, ke tio estas bagatela demando, sed fine li diris, “O, eble kelkajn jarcentojn.” Kaj senrilate li aldonis, “Vidu, la nigruloj estas tre stultaj. Kiam estas tre varme, ili saltas en riveron, eliras, ne sekigas sin, malvarmumiĝas, kaj mortas.”

Rande de nia vilaĝo estis “nigrula tendumejo”, fakte kaduka iama biendomo. La senŝuaj, tre malriĉaj aborigenoj foje ŝanceliĝis en la vilaĝcentron aĉeti bieron. Ili ne rajtis trinki alkoholon, sed estis levofenestreto en la malantaŭa muro de la hotelo, tra kiu la hotelestro ŝovis “nevodate” botelojn da biero, se la nigruloj povis pagi. Tiuj homoj, necivitanoj de la lando, en kiu ili naskiĝis, sen juraj rajtoj, vere faris mizeran impreson sur ni infanoj. Ĉu nia instruisto pravis en sia juĝo?

Tia estis la situacio en la 1940aj jaroj. Multo ŝanĝiĝis intertempe, sed estas


TREVOR STEELE (ADELAJDO)

neaborigenoj, kiuj ŝajne ankoraŭ vivas mense en la epoko, kiam la indiĝenoj estis pli-malpli samrangaj kiel kanguruoj, sed malpli popularaj ol tiuj hopobestoj.

En 2014 aperis la libro *Dark Emu* (malluma emuo¹) de Bruce Pascoe, kiu ĝisfunde atakis tiun tradician manieron rigardi la homojn, kiuj laŭ sciencistoj vivas sur tiu ĉi kontinento eble pli ol 60 000 jarojn. Pascoe prezentis la kialon de tiu tradicia eŭropa bildo, laŭ kiu aborigenoj estis nuraj ĉasistoj-kolektistoj, kiuj ne kultivis la teron, ne loĝis en dom(et)oj, kaj meandris trans la pejzaĝon, esperante povi lancumi kanguruojn – dume la virinoj foje elfosis ignamon aŭ rikoltis berojn. Ĉar ili ne kultivis la teron, ili ne rajtis laŭ brita juro pretendi posedon de ĝi. Eŭropanoj, estante siajuĝe pli inteligentaj, civilizitaj, kaj portantoj de la vera religio, rajtis establi bienojn, kie iam aborigenoj loĝis.

Sed, kiel Pascoe atentigas, nun ni havas grandan kvanton da pruvoj, ke ilia vivmaniero estis, laŭ la regiono, teĥnike progresinta. Ili vivis ofte en vilaĝoj en lerte konstruitaj domoj. Ili kultivis valorajn kaj sanigajn grenojn. Ili uzis irigacion. Ili

¹ **Malluma emuo:** Aborigenoj kredis vidi en la firmamento silueton de emuo, kiu malaperis somere.



Bruce Pascoe

ekspluatis tre profesinivele kunmetitajn ŝtonbarilojn por kapti fiŝojn. Ili konstruis grandajn retojn por kapti birdojn. Kaj ili tre kapable uzis la rimedojn de la ĉirkaŭa mondo kaj konservis la biomedion multe pli bone ol la invadantoj.

Ankoraŭ hodiaŭ oni trovas vestiĝojn de tiu rafinita vivstilo, sed la plej bonaj atestantoj estas la unuaj eŭropanoj kaj esploristoj kaj bienistoj, kiuj je sia miro vidis tiujn vilaĝojn, fiŝkaptilojn kaj kultivatajn kampojn: inter la plej elokventaj atestantoj estis Mitchell, Sturt, kaj Eyre, kiuj senrezerve admiris la faritaĵojn de la aborigenoj. Sed eĉ tiuj relative humanaj homoj "modifis" siajn raportojn, ĉar tiuj ne kongruis kun la celoj de eŭropanoj, kiuj venis eksproprieti la aborigenojn kaj forigi la pruvojn, ke tiuj ne estas nuraj ĉasistoj-kolektistoj.

Eksterordinara estis la kazo de la homo, kiu "malkovris" Aŭstralion, James Cook. Li ne havis ŝancon vidi aborigenajn domojn, fiŝkaptilojn kaj tiel plu, sed post

kontakto multloke kun aborigenoj ĉe la orienta marbordo de la lando, li skribis:

Laŭ tio, kion mi diris pri la indiĝenoj de Nova Holando, ili eble ŝajnas esti la plej mizeraj homoj sur la Tero, sed fakte ili estas multe pli feliĉaj ol ni eŭropanoj.

Ili vivas en trankvilo ne ĝenata de malegaleco de rangoj; la tero kaj la maro de si mem provizas al ili ĉiajn necesojn de la vivo; ili ne deziras grandiozajn domojn, endomajn posedaĵojn ktp., ili kuŝas en varma kaj bela klimato kaj ĝuas tre sanan aeron, tiel ke ili apenaŭ bezonas vestojn kaj ili ŝajnas tute konscii pri tio; ĉar multaj, al kiuj ni donacis tukojn ktp., senzorge lasis ilin sur la mara plaĝo kaj en la arbaro, kvazaŭ aferojn neniel utilajn.

Mallonge, ili ŝajne ne alte taksis ion ajn, kion ni donis al ili, kaj ili ne fordonus ion apartenantan al ili kontraŭ artiklo proponata de ni. Miaopinie tio pensigas, ke ili kredas, ke ili havas ĉiujn necesojn de la vivo kaj nenion superfluan.

Tamen, kiam li atingis la nordan pinton de la kontinento, Cook deklaris, ke la lando apartenas al reĝo Georgo III – kaj do ne al la homoj kontentige vivantaj tie.

Se ne eblis nei la ĉeeston de imponaj arkitektaĵoj, eblis aserti, ke la primitivaj sovaĝuloj tute ne kapablas konstrui tiajn ŝtonajn domojn, fiŝkaptilojn, planti, rikolti, kaj prilabori grenojn. Ne, tiuj atingoj devis esti postlasaĵoj de supera raso (probable eŭropa), kiu intertempe forpasis (pro vulkanaj erupcioj?). Do kiam eŭropanoj transprenas la teron de Aŭstralio, ili simple rekonkeras tion, kion atingis iliaj antaŭuloj.

La verko de Bruce Pascoe fariĝis furoraĵo. Ĝi estis eldonata eĉ plurfoje jare, kaj ne eblas nei ĝian efikon inter centmiloj


da legintoj. Kaj ĝi vekis la koleron de dekstruloj, kiuj volas konservi la tradicion, kiu ŝajne rajtigis la eŭropan invadon de la kontinento. Sed Pascoe ne nur volas revizii la pensmanieron de neaborigenaj aŭstralianoj. Fojon post fojo li atentigas pri la supereco de la aborigena kulturo rilate la biomedion. Ni lernu de aborigenoj kiel trakti la ekologion de la lando, kiu tiom suferas post la eŭropa invado.

Evidente la popularecon de la libro tre ĝenis la dekstrulojn. Unue oni atakis la aŭtoron. Bruce Pascoe asertas, ke li estas posteulo de tasmaniaj aborigenoj.

Tio estus malfacile provebla, ĉar neniu plensanga aborigeno vivis sur tiu insulo post 1876, kiam Trukanini mortis². Estis ja aborigenaj virinoj forkaptitaj de fokĉasistoj, kiuj vivis diversloke sur insuloj, sed iliaj idoj estis almenaŭ parte eŭropaj. Tasmanianoj, kiuj nomas sin aborigenoj, nepre havas grandan porcion de neaborigena "sango". Pascoe ne aspektas aborigena, sed kiel tio senvalidigu lian verkon?

Bruce Pascoe estas la plej granda fraŭdulo en la historio de aŭstralia literaturo, asertas dekstruloj. Sed ĉu ili atente legis la libron? Ĉu ili povas nei la raportojn de la unuaj eŭropanoj kaj la ekziston de restaĵoj de tre imponaj strukturoj? Antaŭ ĉio, ĉu ili povas nei, ke la aborigenoj estas same homaj, same inteligentaj, kiel ni, kaj dum la jarmiloj lernis kiel vivi en tiu ĉi foje malfacila medio? Ĉu la kritikantoj restas sur la scionivelo de mia bazlerneja instruisto?

Malfeliĉa paradokso estas, ke kiam eŭropanoj masakris, forĉasis aborigenojn, detruis iliajn vilaĝojn kaj kultivejojn, kaj enkondukis fremdajn bestojn, kiuj multe kontribuis al degenerado de la tero, ili parte atingis la celon prezenti la nigrulojn kiel primitivulojn kun sencela vivmaniero. Kiam mi memoras la ebriajn aborigenojn, kiuj nudpiede ŝanceliĝis inter sia "tendumejo" kaj la hotelo de nia vilaĝo, kaj komparas tiujn homojn kun tiuj prezentitaj en la libro de Bruce Pascoe, mi sentas doloron pri tia katastrofo. **E**



² Mia romano *Paradizo ŝtelita* prezentas la tragedion de la tasmanianoj.

Decimala tempo

J MARC SCHMIDT (COOMA)

Ni esperantistoj konsentas, ke Esperanto estas pli facila, pli logika, pli simpla, kaj pli taŭga kiel internacia lingvo ol iaj naciaj lingvoj. Ne necesas listigi la kialojn! Sed Esperanto ne iĝis la internacia lingvo.

Mi pensas, ke decimala tempo iom similas Esperanton. Decimala tempo ne estas nova ideo. Oni uzis decimalan tempon dum ĉirkaŭ 10 jaroj en Francujo,

post la franca revolucio de 1789. Tamen homoj, ŝajne, preferis la 24-horan sistemon, do francoj eventuale tute adiaŭis decimalan tempon ĉirkaŭ 1801.

Pli frue, oni uzis decimalan tempon en Ĉinujo. Tiam, oni nomis 1% de la tago (t.e. 14 minutoj kaj 24 sekundoj) – “kè” (刻).

Oni povas nomi 10% de la tago “deci-tago”, 1% “centi-tago” kaj 0.1% “mili-tago”. Do:

Nomo	Daŭro	Decimalo	Elcento	24-hora ekvivalento
tago (t)	1 tago	1	100%	24 horoj
Deci-tago (dt)	1/10 de tago	0.1	10%	2 horoj, 24 minutoj
Centi-tago (ct au q)	1/100 de tago	0.01	1%	14 minutoj, 24 sekundoj
Mili-tago (mt)	1/1000 de tago	0.001	0,1%	1 minuto, 26,4 sekundoj
“Zamo” (z)	1/100 000 de tago	0.00001	0,001%	0.864 da sekundo

(Ne ekzistas decimala prefikso por 1/100 000, do mi kreis tiun ĉi nomon “Zamo”. Ĝi estas preskaŭ unu sekundo.)

Mi opinias, ke tiu ĉi sistemo estas tre simpla kaj logika (kiel nia Esperanto!). Ni

jam uzas la samajn prefiksojn por longeco, volumo kaj peso. Tre facile esprimi la horon!


Ekzemple:

S-ro: Kioma centi-tago estas?

S-ino: Nu, la 51a kaj 4! (Per nia sistemo, 12:21 ptm)

S-ro: Dankon! Jen la tempo por manĝi!

Daŭras >



Decimala horloĝo farita de Pierre Daniel Destigny en Rouen, France, inter 1798 kaj 1805. La malgranda horloĝo montras 24-horan tempon. Do: 31.6 centitagoj = 7:35 atm.

Nu, oni povas skribi tiun kiel 0.514 (tagojn), aŭ 51.4 (centi-tagojn), aŭ 5.14 (deci-tagojn), aŭ 514 (mili-tagojn). Mi mem preferus uzi centi-tagojn. Do la 70a estus tempo por foriri la laborejon, kaj la 30a estus tempo por manĝi matenmanĝon! Eble oni povus uzi pli prononceblan vorton kiel "centi-tago". Eble "kuo" (kiel la vorto por la litero "q") laŭ la prononco de la ĉina vorto (刻). Do tiel ni Esperantistoj povus uzi la literon "q" por tempo!

Ekzemple:

S-ino: Hej, amiko! Kiam vi finos vian hejmtaskon!

S-ro: Post $\frac{1}{2}$ q!

S-ino: Bone!

Nu, tiu maniero apartigi la tagon malsukcesis. (La Esperanto-valuto, la spesmilo (₰), simile ankaŭ malsukcesis). Kvankam Esperanto mem estis pli sukcesa ol kaj decimala tempo kaj la

spesmilo, la fina venko neniam okazis. Kial oni ne volas uzi decimalan tempon, spite al ĉi ties logikeco kaj simpleco? Kial pli da homoj en la mondo ne lernas Esperanton? Kial plejmulte da usonanoj estas feliĉaj eviti decimalan mezuron? La altiro al la pasinteco kaj tradicio, eble, aŭ simple tro strange. Eble ĉi tiu vere estas pli natura por homoj ol centimetro, kaj minuto estas pli natura ol mili-tago. Eble Ido plejparte malsukcesis inter Esperantistoj pro la samaj kialoj.

Sed kial ni en Aŭstralio feliĉe uzas centimetrojn, miligramojn, mililitrojn, dolarojn kaj cendojn? Iom enigme, ĉu ne?

Nu, mi ŝatas decimalan tempon! Krome kiel instruisto de elementa lernejo mi uzas decimalan tempon por klarigi pri la metrika sistemo. Mi lastatempe aĉetis decimalan brakhorloĝon de la firmao Svalbard, kiun mi portas ĉiutage (vidu foton, malsupre). Tre bone. 



La Svalbard-brakhorloĝo. La 54a centitago = 12:56ptm

Kvizoj pri logiko

Ofte oni povas spekti televidajn kvizojn pri ĝeneralaj scioj. Por bone sukcesi, oni devas scii multon pri historio, famaj personoj, sporto, filmoj, muziko, ktp. Sed nun ankaŭ ekzistas televida kvizo pri logiko. Vi nur bezonas logike pensi kaj atente legi la demandojn. Bona ekzerco por la cerbo. La televida elsendo nomiĝas la Klubo 1%.

Komence estas facilaj demandoj, kiujn 90% el la pridemandita popolo sukcesas ĝuste respondi, kaj poste ili daŭrigas ĝis demando, kiun nur 1% el la popolo kapablas respondi. Se oni sukcesas respondi al tiu demando, ili diras, ke vi rajtas aparteni al la Klubo 1%. Komence estas 100 partoprenantoj, sed se ili ne ĝuste respondas, ili devas halti ludi, do daŭre estas malpli da ludantoj ĝis kiam estas nur malmultaj, aŭ eble eĉ neniu. Unue tiu kvizo okazis en Britio, sed poste ankaŭ en Usono, Aŭstralio, Francio,

NICOLE ELSE (SIDNEJO)

Germanio kaj probable aliaj landoj. Jen du ekzemploj. Mi iom ŝanĝis unu el ĝi por ke ĝi taŭgu por esperantistoj.

Demando 1

Bob Felby ŝatas bonajn fragojn.
Donald Broadribb ŝatas dikajn bananojn.
Marcel Leereveld ŝatas molajn legomojn.

- Kiu ŝatas tomatan supon?
- a. Katalin Kovats
 - b. Renato Corsetti
 - c. Kep Enderby
 - d. Trevor Steele


Demando 2

La patrino de Johano havas kvar filojn.
La plej aĝa nomiĝas Nordo, la dua Okcidento, kaj la tria Oriento.
Kiel nomiĝas la kvara?

Respondoj sur paĝo 29 

Solvo de komputila krucvortenigmo

Jen la solvo de la krucvort-enigmo de *Esperanto sub la Suda Kruco*, numero 156, decembro 2024 (paĝo 29).



La originoj de ĝino kaj ĝiaj uzadoj

HEATHER HELDZINGEN (MELBURNO)

Ĝino estas distilita alkohola trinkaĵo, kiu evoluis dum jarcentoj kaj havas fascinan historion, kiu komenciĝis en la Mezepoko. Ĝiaj originoj troviĝas en antikvaj herbaj kuraciloj, kaj hodiaŭ ĝi estas unu el la plej popularaj alkoholaĵoj tutmonde. Nun mi informas vin pri la originoj de ĝino, ĝia transformado en la modernan trinkaĵon, kiun ni konas hodiaŭ, kaj la diversaj manieroj, per kiuj ĝi estas uzataj.

La historio de ĝino komenciĝas per ĝia prafonto, *genièvre*, tradicia nederlanda alkoholaĵo, kiu datiĝas de la 16a jarcento. *Genièvre* origine estis evoluigita kiel medicina toniko. La nederlandanoj uzis juniperajn berojn, kiuj estas riĉaj je antioksidantoj, kiel la ĉefan ingrediencon. Junipero estis konsiderata havi kuracajn efikojn kaj estis ofte uzata por kuraci

malsanojn, inkluzive problemojn pri la reno, digesto, kaj eĉ la pesto.

La plej frue konata recepto por *genièvre* aperis en la 16a jarcento en Nederlando, kie distilistoj miksis maltovinon kun juniperaj beroj kaj aliaj kuracherboj. Oni trinkis ĝin ĉefe pro ĝiaj supozataj sanigaj avantaĝoj. La uzo de juniperaj beroj ankaŭ donis al la alkoholaĵo ĝian karakterizan guston, kiu poste difinis ĝinon.

Kvankam *genièvre* estis havebla en Nederlando kaj Belgio dum jarcentoj, estis en Anglio, ke ĝino vere komencis evolui kiel la trinkaĵo, kiun ni rekonas hodiaŭ. La turnopunkto okazis en la 17a jarcento, kiam nederlandaj distilistoj alportis *genièvre* al Anglio, precipe post la Glora Revolucio de 1688. La nova reĝo, Vilhelmo de Orange, alportis nederlandajn influojn, inkluzive la popularecon de ĝino.



William Hogarth, Ginvoĵeto, 1751



Ĝino kaj tonikakvo

Antaŭ la komenco de la 18a jarcento, ĝino fariĝis vaste populara en Anglio, sed ĝi fariĝis ankaŭ socia problemo. Pro la relativa facileco de produktado kaj la disponebleco de malmultekosta greno, ĝino fariĝis akirebla de ĉiuj klasanoj, kaj rezulte amase tro konsumata kondukante en kelkaj okazoj de socia malkontento. Tiel leviĝis la fama Ĝin-Furoro (1720–1751), periodo de amasa ĝinkonsumado, kiu kontribuis al malriĉeco kaj publika malordo.

Por kontraŭbatali la negativajn efikojn de ĝino la brita registaro enkondukis la Ĝino-Leĝon de 1736, kiu trudis altajn impostojn kontraŭ la produktado de ĝino. Kvankam ĉi tiu leĝo estis ĉefe neefika en malpliigado de ĝinkonsumado, ĝi kondukis al la evoluo de pli rafinitaj ĝinindustrioj, kun la apero de distilejoj, kiuj produktis pli altkvalitajn produktaĵojn.

Kiam ĝino fariĝis pli populara, distilistoj komencis eksperimentadi pri la gustokarakterizo, kaj la trinkaĵo evoluis en diversajn specojn. Ĉirkaŭ la 19a jarcento, la enkonduko de *London Dry Gin* (londona seka ĝino) alportis grandan ŝanĝon. Ĉi tiu speco estis karakterizita per sia seka, viviga gusto kun emfazo de junipero, kaj la uzo de neŭtrala alkohola bazo. *London Dry Gin* rapide fariĝis la norma stilo por ĝino, kaj ĝiaj produktometodoj disvastiĝis tutmonde.

Hodiaŭ, ĝino estas trinkata tutmonde en diversaj formoj, ĉu en kokteloj, ĉu kiel sola alkoholaĵo. Ĝia diversuzebleco estas unu el la kialoj por ĝia daŭra populareco. Oni povas trinki ĝinon puran, kun glacio, aŭ trinkate en multaj diversaj kokteloj, inkluzive en klasikaj trinkaĵoj kiel ĝino kaj tonikakvo, martinio (*martini*), kaj *Negroni*.

Ĝino kaj tonikakvo, verŝajne la plej fama ĝinbazita koktelo, havas originon kiu datas de la brita kolonia epoko. Britaj

soldatoj en Barato komencis miksi ĝinon kun tonikakvo por maski la amarguston de kinino, kiun oni uzis por kuraci malarion. Tiu trinkaĵo fariĝis populara kaj freŝiga trinkaĵo, precipe dum la varmaj monatoj.

Alia daŭra klasikaĵo estas la martinio, farita el ĝino kaj sekaj vermoj, ornamita per olivo aŭ citrono. Ĝi havas asocion kun mondumeco kaj eleganteco, elmontrita per ĝia ofta apero en popola kulturo (precipe en filmoj kiel tiuj de la serio James Bond).

En la lastaj jaroj, ĝino spertis renesancon, kun nova ondo de malgrandaj distilejoj produktantaj artometian ĝinojn kun unikaj plantoj kaj gustoj. La hodiaŭaj ĝinoj ofte estas infuzitaj kun vasta diverseco de plantoj preter junipero, inkluzive de citruso, lavendo, rosmareno, kaj eĉ pli ekzotikaj ingrediencoj kiel rozpetaloj, kaj spicoj. Ĉi tiu diverseco kondukis al eksplodo de originalaj kokteloj kaj novaj manieroj ĝui la alkoholaĵon.

La renesanco de ĝino evidentiĝas ankaŭ en la ekapero de ĝinfestivaloj kaj eventoj, kiuj festas la metion kaj arton de distilado. Amantoj povas provi diversajn ĝinojn, lerni pri la distilada procezo, kaj esplori la fascinan historion de ĉi tiu amata alkoholaĵo. Bedaŭrinde mi partoprenis ĝinfestivalon antaŭ nelonge kaj rapide ebriiĝis! Do estu zorgema!

La longa historio de ĝino, de ĝiaj fruaj tagoj kiel medicina toniko ĝis ĝia moderna stato kiel amata alkoholaĵo en kokteloj kaj aliaj uzoj montras ĝian daŭran allogon. Ĝia gustodiverseco kaj riĉa heredaĵo daŭre kaptas la atenton de drinkantoj ĉirkaŭ la mondo, farante ĝinon konstanta havaĵo sur bretaroj kaj en hejmoj. Ĉu en klasika ĝino kaj tonikakvo aŭ en originala nova miksaĵo, ĝino restas trinkaĵo, kiu evoluas kun la tempo, dum samtempe ĝi honoras sian pasintecon. 

Kreema Kursaro **TERRY MANLEY (ARMIDALE, NSK)**

Tuj post Kristnasko mi kaj mia partnero malsaniĝis pro ia gripo. Ĝi daŭris tre longe, preskaŭ tri semajnojn. Pli longa ol ia ajn gripo pro kiu mi suferis antaŭe. Feliĉe ni povis konsoli unu la alian, la vetero estis agrabla kaj ni jam festis, do ne devis eliri pro ia kialo. Nia plej ŝatata butikoj, la frukta kaj legoma vendejo, liveris al ni senkoste por niaj bezonoj. Krome estas multe da legomoj en la ĝardeno. Mi ne planis iri al Adelajdo por la kursaro kaj retrospekte tiu estis bona decido.

Je la 17a de januaro ni sentis nin pli energiaj kaj geamikoj invitis nin al Bellingjen por spekti siajn kreaĵojn post semajno de arta kreemo, ĉe Kreema Kursaro (*Camp Creative*). Tiu kvintaga kursaro jam daŭras ĉiun januaron dum 39 jaroj. El modesta komenciĝo ĝi evoluis al granda afero. Ĉijare estis pli ol okdek kursoj kun mil partoprenantoj. Do averaĝe po 12 personoj en ĉiu kurso, sufiĉe malmultaj por havi individuan instruadon. Geamikoj produktis kudritan artaĵon, lignajn bovlojn per tornilo, kaj seĝon el krudaj lignopecoj. Aliaj afrike muzikis en grupo de tamburistoj, kantis en ĥoro, ukulelis en grupo kantanta kantojn de David Bowie, aŭ ludis en orkestro por blovinstrumentoj. La elektoj estis multegaj. Konstrui kanuon en kvin

tagoj; fabriki ukulelon, arĝentajn juvelojn aŭ feltajn ĉapelojn; pentri akvarelojn aŭ japanajn inkpentraĵojn; poezii; verki rakonton aŭ kanton; fari mozaikon el pecoj de vitraĵo aŭ argilaĵo; ripari vestojn; kolorigi ŝtofon ktp, ktp. Nekredeble. Ĉiuj al kiuj mi parolis ege ĝuis sian kurson kaj la rezulton, kiun ili havis.

Kvankam la kursĉambroj estas nur por partoprenantoj, je la lasta tago oni povis vagi libere je tagmezo tra la klasĉambroj por spekti la metiistojn, artistojn kaj iliajn kreaĵojn. Dum la lasta tago posttagmeze la infanoj prezentis muzikteatraĵon kaj cirkolertaĵojn. En la vespero estis spektaklo de la muzikistoj, kantistoj kaj poetoj. La etoso estis vere kreema kaj vigla.

Komence ni hezitis iri pro la veterprognozo, kiu indikis multe da pluvo. Bellingjen estas apud la Rivero Bellinger en fekunda valo, kie ofte pluvas en la somero. Meteologoj prognozis proksimume 100 mm da pluvo en tri tagoj kaj ni planis tendumi. Feliĉe ne tiom da pluvo falis kaj ni trovis sufiĉe sekan teron sur kiu ni tendumis. Survoje hejmen (200 km okcidenten) daŭre pluvis, sed ni tre kontentis, ke ni riskis iri. La evento estis ja ĝuinda. **E**



Mia sperto de la somerkusaro 2025

HELEN PALMER (ADELAJDO)

Por mi la januaro somerkusaro estis riĉa, plena, kaj okupata.

Mi organizis:

- La Esperanto-filmet-vesperon kiu, mi esperas, inspiras kelkajn homojn (ni ankaŭ vidis 2024 fiimeton de Sud-aŭstralio partoprenanto William Georgeson)
- La duon-tagan ekskurson per tramo al la maro
- La vesperan ekskurson al la Chihuly-vitroskulptura ekspozicio en la Adelajdo botanika ĝardeno.

Mi ankaŭ prelegis pri la temo *Kio estas historio?* Dum tio mi komparis la longdaŭran historion de Aboriginaj homoj en Aŭstralio al la historio de homoj en aliaj partoj de la mondo.

Mi partoprenis la altnivelajn klasojn de Trevor Steele pri bataloj, murdistoj, armiloj, perfido, torturo, viroj kaj la historio de la Mez-oriento kaj Eŭropo. Li vere havas mirandan memoron pri historio de tiuj epokoj.

Estis ĝojo por mi, ke amikino Louise venis de Wilcannia NSW, kiel komencanto, kaj mia nevino kaj ŝia edzo ĉeestis (en la mez-nivela grupo). Ili antaŭe ĉefe lernis per la apo Duolingo. Kiam mi parolis kun multaj da la junuloj dum la jaro, ili konfirmis mian/nian suspekton, ke ofte la unua paŝo por multaj homoj estas per Duolingo.

Multaj el la partoprenantoj prezentis ion dum la posttagmezaj kaj vesperaj periodoj. Ili aldonis al la riĉeco de la evento (kaj iomete helpis dividi la pezecon de la organizado). Mi pensas, ke ĉiuj kiuj prezentis ion sentis sin iomete

memfiera. Tiuj estis: Sandor Horvath, Charles Stephenson, Kam Lee, Sarah Palmer, Marumi Smith, David Ryan, William Georgeson, Vere Williams kaj Benno Lang. Heather Heldzingen prezentis pere de Katja Steele. Kaj per la reto (Zoom) Jonathan Cooper kaj Kit Kelen prezentis. Mi devas danki tiujn kuraĝajn esperantistojn. (Pardonu se mi forgesis iun.)

Okazis la jarkunveno de AEA, kaj la herooj de la estraro daŭrigos sian laboron en 2025, kun novulo William Georgeson (kiu povos bone reprezenti junulojn). Dankojn al ili.

Trevor prezentis unu el siaj famaj kvizoj. La unua ero estis pri Esperantujo kaj E-historio. Se mi ĝuste memoras, Bradley McDonald kaj Cameron Burton de Nov-Zelando elstare partoprenis. Kaj David Ryan el Nov-Zelando kaj Andrew Woods el Adelajdo havis bonajn respondojn al preskaŭ ĉiuj demandoj. Kiaj mirindaj paroj!

Katja Steele preparis por ni sesion dum kiu ni uzis niajn manojn kaj kreemon por krei kartojn. La tablo estis plena da verda papero, tondiloj, gluo, koloroj kaj babilado. Kaj kelkaj da ni kaptis tian oportunun skribi kartojn al foraj E-amikoj (preskaŭ malaperanta kutimo hodiaŭ).

La jara kutimo de fotokonkurso estis pli sukcesa, danke al la instruado de Jonathan, per lia prezentado *Kiel fari pli bonajn fotojn*.

Le ĉeestantoj de la ludvespero de Sandor ridegas ĝis la larmoj fluis. Ni bone memoros "Bifo kaj Bufo"!

Kaj ni nun scias, ke la plej ŝatata plado de vjetnamoj estas "*pho*" (supo) kaj la nacia floro estas la akvolilio. *Daŭras >*

Dankon, Hoan pro via malkovrado de Vjetnamio.

Franciska Toubale refoje organizis la tradicion de legado por la radioprogramo. Ĉifoje estis pri krim-novelo. Aŭskultu 3ZZZ dum nia vintro!

Grupo da homoj ĝuis la sperton kanti kune, uzante la kantlibrojn faritajn de Sud-aŭstraliano Bob Felby (kiu ne povis ĉeesti kaj mankis al ni).

Dum miaj matenaj lecionoj, mi ofte aŭdis la ridojn de la meznivela grupo apuda, kun ilia instruisto Hoan Trăn. Ili kantis, ridis, komparis, debatis kaj ĝenerale lernis multon per siaj voĉoj. Unufoje ĉe la fino de mia leciono, mi vidis sur ilia tabulo du bildoj: unu de Zamenhof kaj unu de Sandor. Sube estis interesaj listoj de la malsamecoj de tiuj du esperantistoj.

Dum la lasta vespero, ĉiu membro de la komencanta grupo de Sandor Horvath

stariĝis kaj prezentis iomete pri si mem. Bona progreso.

Bedaŭrinde estis kelkaj homoj, kiuj suferis "kongresan malsanon", kaj pro tio maltrafis parton de la semajno.

La loko, en preskaŭ la centro de Adeĵajdo, havis lumajn kaj komfortajn spacojn kun klimatizilo dum la varmegaj tagoj. La retkapablo kaj ekranoj estis modernaj. Kaj la manĝaĵo gajnis la nomon: "la plej bona manĝaĵo de iu kongreso!" Ho!

Jes, kiel mi komence skribis – estis riĉa kaj plena tempo. Mi vere ĝuis vidi novajn vizaĝojn inter ni. Do, nun la preparado de la venonta somerkusaro jam komencis. Venu, lernu kaj ĝuu en Aŭklando en Nov-Zelando, 11–17 januaro 2026.

Komencu prepari viajn prelegojn, filmetojn kaj aktivecojn. Mi vidos vin tie!



Helen faras demandon al Jonathan

Somerkursaro, kiel neniuj dezirus sperti

FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Mi eĉ ne bezonis trovi la vojon de la flughaveno al la Kolegio de St Ann en norda Adelajdo, ĉar Indrani afable veturigis min ĝis tiu konstruaĵo, tipa de la 19a jarcento, al kiu aldoniĝis pli modernaj partoj, lumaj salonoj, kie vitraĵo anstataŭas unu muron, kun vido al montetoj en la foraĵo kaj, je la piedo de la konstruaĵo al tenisejo kaj ĝardeno.

Je mia alveno, krom konataj vizaĝoj, mi rimarkis tiujn de junaj homoj. Ĝojiga afero.

La instruistoj entuziasme prezentis siajn kursojn. Riĉa programo atendis la ĉeestantojn. Promesplena komenco!

Tamen, la unua punkto estis por mi senfina. Mi ne sukcesis malfermi la fenestron, kvankam mi senespere bezonis freŝan aeron. En la banĉambro unu krano likis, eterna gutado ritmante mian vekan staton ĝis torturo. Kvankam ĉio estis ordigita la sekvan tagon, mi ne sentis min komforta kaj je la tria tago simple kolapsis. Heather kaj Indrani veturigis min al publika kliniko, kie la kuracisto diagnozis la ĉeeston de viruso, kaj agnoskis, ke ne ekzistas rimedo krom

atendi ke ĝi pasu. Mi do pasigis la ceteron de la somerkursaro izolita en ĉambro sur kies pordo oni gluis *"No entry. Occupant unwell"* (Neniu eniro. Ĉeestanto malsana).

Mi tamen ne estis tute forgesita: Heather venis por enketi ĉu mi volas trinki aŭ manĝi. Iom poste anstataŭis ŝin Katja, sed mia menso estis tiom konfuzita, ke mi ne komprenis ke la viruso daŭrigis sian vojon, farante pli kaj pli da viktimoj. Mi eksciis tion nur poste.

Mi kulpigas la klimatizilon. Dum la tempo de KOVIM, montriĝis ke la aero kiu ne estis renovigebla en la hoteloj kontribuis al la disvastigo de la malsano. La aero devus nepre esti refreŝigita. Ĉiu salono nepre havu malfermeblan fenestron. Bedaŭrinde la tendenco estas inversa. Francio antaŭen iras Aŭstralion en tiu kampo. La domoj ricevas rangon laŭ la grado de varmizoleco cele ŝpari energion. Koncepto pri komforto ŝanĝiĝis.

Dankon al tiuj, kiuj sendis mesaĝon aŭ kuracondojn, aŭ kiuj helpis iamaniere dum mi estis senpova: Andrew, Jennifer, Marumi... kaj aparte Katja, kiu povas tiom bone plani. **E**

Solvoj de la kvizoj pri logiko (de paĝo 23)

Necesas rimarki, ke Johano ja estas unu el la 4 filoj, do la 4a filo nomiĝas Johano.

Demando 2

La ĝusta respondo estas Trevor Steele. Kia? Oni devas rimarki, ke la adjektivo ĉiam komenciĝas per la komenclitro de la antaŭnomo kaj la substantivo komenciĝas per la komenclitro de la familia nomo.

Demando 1

El la regionoj

KVINSLANDO

Esperanto en Brisbano

Brisbana Esperanto-Societo (BES) kunvenas ĉiumonate, je la 4a dimanĉo de la monato, en la Biblioteko ĉe Brisbane Square, kun bona nombro da ĉeestantoj. Vizitantoj estas ĉiam bonvenaj. Ni ankaŭ festas Zamenhofan Tagon ĉe alia loko, lastfoje ĉe la fama Roma Street Parkland en centra Brisbano. Post trankvila promeno tra la mirinda parko kun plej bonaj floroj, ni ĝuis tagmanĝon en la proksima restoracio.

Ni ĝojas raporti, ke du el niaj membroj, Jennifer James kaj Vere Williams, ĉeestis la somerkursaron en Adelajdo. Raportoj pri tio estis elsenditaj al membroj per retroŝto.

Kelkaj el ni ankaŭ havas Esperantajn korespondamikojn en diversaj landoj. Aliaj partoprenas per Zoom kun la Bahaa Esperanto Ligo, kaj kompreneble kun nia propra AEA. Ni jam havis nian unuan renkontiĝon de 2025. Ankaŭ okazas ĉiumonataj renkontiĝoj de babilado/kafoklaĉo. Nia jarkunveno okazos en februaro. Dum la jaro ni faras anoncojn

kaj ricevas demandojn en nia grupo en Facebook ("Brisbane Esperanto Society").

– Peter Danzer

NOVA SUD-KIMRIO

Manlia Esperanto-Klubo

Kunvenas kontraŭ la Restoracio Bluewater, Suda Stejno 1a kaj 3a sabatoj de la monato, 10:00. Komencantoj estas bonvenaj. Kontakto Roger (02) 9976 6320

manly@esperanto.org.au

Esperanto-Klubo de la Centra Marbordo

Kunvenas la 3a dimanĉo de la monato, 12:00, ĉe Waterfall Cafe, Kariong. Kontakto Joanne 0413 087 340
centralcoast@esperanto.org.au

Novkastelanoj

Kontaktu Andrew (02) 4951 2084
newcastle@esperanto.org.au

Suda Marborda Grupo

Malgranda grupo kunvenas foje en Bega. Komencantoj bonvenaj. Kontakto Penny (02) 6495 2922



Brisbanaj esperantistoj ĉe Roma Street Parkland



Zamenhof-festo en la suna korto de Esperanto-Domo, Sidnejo

Zamenhof-festo en Sidnejo

Esperanto NSW kunvenis la 15an de decembro ĉe Esperanto-Domo. Ni tre feliĉis havi la prezidanton de AEA, Sandor Horvath kiel nian specialan gaston.

La festo komenciĝis per prezentado de Rainer Kurz (vizitante el Germanio): *Vojaĝado en Francio per Esperanto*. Tiam Kit Kelen deklamis poemojn en Esperanto. Post tagmanĝo, Masayuki Kobayashi (vizitante el Japanio) prelegis pri Oomoto, studentoj de la Esperanto-kurso de Joanne Cho prezentis proverbojn, kaj ni ludis kolektivian ludon, *Homlupo* [bit.ly/homlupo-ludo]. Fine, ĉeestantoj iris al la supra nivelo por nia librofoiro: superfluaĵ libroj de la biblioteko senpagaj por membroj, kaj sortimento de aĉetebaj novaj libroj.

– Jonathan Cooper

VIKTORIO

Melburna Esperanto-Societo

Ni rekomencis niajn kunvenojn je 6:30 ptm, lundon la 3an de februaro ĉe Ross House, 247 Flinders Lane, Melbourne.

Ekde tiam ni kunvenos la 1an kaj 3an lundon de la monato.

– Joanne Johns

3ZZZ

Kiam Karlo Egger decidis ĉesi kontribui al la Esperanto-programo en 3ZZZ pro sanproblemoj meze de 2024, estis klare, ke sekvos simila decido de Laszlo Farkas, kiu, tamen, elsendis kun ni ĝis decembro 2024. Neatendite dum mia restado en Eŭropo venis peto de studento el la universitato La Trobe, Brendan Price. Li pretis lerni la lingvon kaj helpi evolui nian programon kadre de siaj studoj pri internaciaj rilatoj. Kia oportuno!

Brendan ekde septembro regule ĉeestas la elsendon kaj kontribuas diversmaniere. Li sukcese sekvis la kurson por havi la rajton elsendi programon. Li ĉeestis ankaŭ la somerkursaron en Adelajdo por firmigi sian konon de la lingvo. Ekde februaro li havos la samajn respondecinojn kiel Heather Heldzingen kaj mi.

Daŭras >

Intervenias de tempo al tempo alia juna viro, William Georgeson. Dum la Zamenhofa festo en 2023, li prezentis sin kiel komencanton. Post studo en la somerkursaro en Ballarat kaj pro jaro en la Melburna Esperanto-Societo, li nun tute bone majstras Esperanton.

Do ni neniam malesperu, ŝanĝo de cirkonstancoj okazas per si mem, neatendite.

Kurso en U3A Knox

Koincide kun la pandemio, la magistrato en Knox (urbo oriente de Melburno) decidis aldoni al la ekzistantaj, novajn konstruaĵojn, parte por la uzo de la Universitato de la Tria Aĝo (U3A), parte por dividi kun aliaj grupoj kiel la piedpilka klubo. Dum la konstruperiodo la klaskunordiganto tre avare donis aliron al klasĉambro. Esperanto ne allogante multe da homoj suferis pro tio. Tamen daŭre regule studas kvaropo. Nun ne plu mankas spaco. Reklamoj pri kurso por komencantoj estis senditaj en la novaĵletero de U3A Knox, kune kun la materialo celante membriĝon por 2025.

Ni atendu. Kio estos la rezulto?

– Franciska Toubale

SUD-AŬSTRALIO

Zamenhofa festo en Adelajdo

Nur sep esperantistoj kunvenis la 15an de decembro: kelkaj estis for, kelkaj malsaniĝis, kaj la 40° C temperaturo mallogis kelkajn. Tamen ni havis interesajn kontribuojn al la festo:

- Deklamo de kelkaj poemoj
- Interesa artikolo, *Mondo por ĉiuj lingvoj sen lingva diskriminacio*, kiu estis prezentita de UEA okaze de la Tago de Internaciaj Homaj Rajtoj, la 10an de decembro 2024. Estis la 70-jara datreveno de la aprobo de UEA de Esperanto en Unesko.
- Novaj kantoj komponitaj de Trevor Holton el Viktorio, kiujn ni kantis: *Ni ĉiuj Esperantistu kaj Mi krias hura*.

Poste kompreneble ni ĝuis frandaĵojn kaj trinkaĵon por fini nian Zamenhofan feston.

– Indrani Beharry-Lall 🇬🇧



Zamenhof-festo en Sud-Aŭstralio

Internacie

Informo per BERT SCHUMANN:

La franca esperantista kastelo Greziljono invitas al siaj kursoj en 2025:

- 18–27 aprilo 2025: PRINTEMPAS, intensivaj kursoj por ekzamenoj kun 4 famaj instruistoj: gresillon.org/p
- 30 junio – 10 julio 2025: Maratona Esperanto-kurso kun tri instruistoj, ankaŭ por blinduloj, kun Internacia E-Konferenco: gresillon.org/m
- 24–29 aŭgusto 2025: Verda Naturisma Semajno kun E-kursoj: gresillon.org/n
- 24 oktobro – 2 novembro 2025: AŬTUNAS, kursoj kaj FEI-ekzameno kun Renée Triolle: gresillon.org/au

Agendo de la sekvaj agendoj:

gresillon.org/a. Kontakto: kastelo@gresillon.org

Informo per KATJA STEELE:

La kvina eldono de INK (Interkultura Novelo-Konkurso) atendas viajn novelojn kun la temo: *La detalo kiu ŝanĝas ĉion*
Limdato: 30 junio 2025

bobelarto.ink/konkurso

UEA informas ke, pro neatenditaj cirkonstancoj, la dato de la 110a Universala Kongreso de Esperanto (UK) devis esti ŝanĝita. La UK, antaŭe planita por 19–26 julio 2025, nun okazos la sekvan semajnon, inter la 26a de julio kaj la 2a de aŭgusto 2025, en urbo Brno en Ĉeĥio.

La temo de la kongreso estas *Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj*. Atendas vian malkovron jarcentoj da

kulturaj mirindaĵoj. Brno, la dua plej granda urbo en Ĉeĥio, apartenas al la regiono Suda Moravio, kun la plej granda nombro da burgoj kaj kasteloj en la lando. La urbo havas propran flughavenon kaj estas ne tro malproksime de Prago, Vieno, Bratislavo. Ĝis la komenco de februaro aliĝis jam pli ol 700 esperantistoj, el kiuj tri estas el Aŭstralio. uk.esperanto.net

Informo per HELEN PALMER:

81a Internacia Junulara Kongreso (IJK) – Cisarua (Bogor), Indonezio, 9–16 aŭgusto 2025

Organizita de la Kongresa Komisiono (KK), internacia teamo gvidata de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) kaj Indonezia Esperantista Junulara Organizo (IEJO), kiu gastigas la kongreson.

ijk2025.tejo.org

Informo per GAZETARAJ KOMUNIKOJ de UEA:

Forpasis Renato Corsetti, Honora Prezidanto de UEA.

“UEA profunde bedaŭras informi, ke forpasis D-ro Renato Corsetti (n. la 29an de marto 1941) la 1an de februaro 2025, en la aĝo de 83 jaroj, en Londono. Eksa prezidanto de UEA (2001–07) kaj honora prezidanto de UEA kaj TEJO, li estis multfaka kaj energia kunlaboranto kaj unu el la plej eminentaj figuroj en la esperantista movado, kaj en la itala kaj en la internacia, ekde siaj junaj ĝis siaj lastaj jaroj.” 



Renato Corsetti

KONTRIBUU al ESPERANTO

sub la suda kruco

La limdato por la
venonta numero estas
la 1a de mao. Sendu
artikolojn, rakontojn,
enigmojn, receptojn,
fotojn ktp al
esk@esperanto.org.au -
ni bezonas vin!



Agnoskoj pri fotoj

Kovrilo Petro Danzer

4 William Georgeson

6 KAVA-PECH

12 Macquarie University

17 Wikimedia Commons

19 Kamay Botany Bay Environmental
Education Centre per Wikimedia

20 Magabala Books

21 Fitzwilliam Museum, Cambridge, per
Wikimedia Commons

22 J Marc Schmidt

26 Terry Manley

24 William Hogarth: Royal Academy of
Arts, London

24 Ĝino kaj tonikakvo: Heather
Heldzingen

28 Hoan Trần

30 Petro Danzer

31 Rainer Kurz

32 Helen Palmer

33 UEA

36 Kam Lee

Australian Esperanto Association

GPO Box 2122
Melbourne VIC 3001
Australia

esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
0403 358 941

Sandor Horvath | **President**
Jonathan Cooper | **Vice-President**
Heather Heldzingen | **Treasurer**
Joanne Johns | **Secretary**

Committee Members:

William Georgeson, Terry Manley, Esther Parris

AEA was established for the promotion, teaching, and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.



Bradley McDonald | **President**
Chris Krageloh | **Vice-President**
David Ryan | **Secretary/Treasurer**

Committee Members:

Dave Dewar, Stephen Epstein, Georgia Naish,
Lorraine Wong

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.

New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
[esperantonewzealand@
gmail.com](mailto:esperantonewzealand@gmail.com)
0800 350 781

“Esperanto?”

Have you picked up this magazine by chance and are wondering what language it is? It might look a bit like Spanish, but it's actually Esperanto.

What is Esperanto?

Esperanto was specially planned and created as a neutral second language for people all over the world. So, if you come across someone from, say, Finland, you wouldn't have to speak Finnish and they wouldn't have to speak English.

Originally developed in the 1880s, Esperanto is currently experiencing a resurgence, with more and more people discovering and learning it online. It's spoken in over 100 countries and there are thousands of Esperanto clubs worldwide.

Esperanto is much easier to learn than any national language, because it was designed to be easy to learn. It's completely phonetic, and its grammar is logical and regular.

You can use Esperanto for travel, information, friendship, hobbies, and even business. The World Esperanto Association publishes a list of names and addresses of people who are happy to have you stay with them for free if you speak Esperanto.

The internet makes it easy to connect to Esperanto speakers in any country. Google, Facebook, Firefox and Linux all support Esperanto. There's an Esperanto version of Wikipedia, which has over 300 000 articles (more than the Hebrew version, for example).

Isn't English enough?

National languages like English give an unfair advantage to their native speakers. People who have studied English for over ten years still feel at a disadvantage when talking with a native speaker.

Interested? See the contact details on the inside back cover.

